

~~227~~  
E 9 (45) "1914/18"

ITALUJO

---

La parolado

de la

Itala Ĉefministro

Antonio Salandra

pri

ITALA MILITO

Roma (Romo)

↔ *Campidoglio (Kapitolo) x 2 Junio 1915<sup>a</sup>* ↔

(ESPERANTA TRADUKO)

---

ELDONOJ DE LA

Komitato "Por Italujo per Esperanto,,

PADOVA

**BROŜURO N.<sup>ro</sup> 1<sup>a</sup>**

---

"LA TIPOGRAFICA,, - S. Ugo al Tagliamento - 1915

~~Antonio Salandra~~

Profesoro de Esperanto

**Pirdop** (Bulgarujo)

Salandra, Antonio

327

D  
Esp

ITALUJO

---

La parolado

de la

Itala Ĉefministro

Antonio Salandra

pri

ITALA MILITO

Roma (Romo)

✠ *Campidoglio (Kapitolo)* ✠ 2 Junio 1915<sup>a</sup> ✠

(ESPERANTA TRADUKO)

---

ELDONOJ DE LA

Komitato "Por Italujo per Esperanto",

PADOVA

**BROŝURO N.<sup>ro</sup> 1<sup>a</sup>**

---

"LA TIPOGRAFICA", - S. Vito al Tagliamento - 1915

372.055 - C Esp

1

subtrekio Penndorf 26. V. 28.



---

---

## *Sinjorinoj kaj Sinjoroj,*

mi bonvole akceptis la inviton ĉeesti tiun ĉi kunvenon, por montri kiel la Registaro opinias precipe grava la ellaborajon de nacia solidareco, al kiu ekdediĉigis la Roma Komitato, kaj kiel ĝi esperas ke en ĉiu Komunumo de la Regno, granda aŭ malgranda, leviĝos kaj sin vivtenos, per flamo de entuziasmo, sed ankaŭ per obstina kaj longedaŭra konstanteco de organizado, simila bonfaranta Asocio de personoj kaj de energioj moralaj kaj materiaj.

Ni eniris en la plej grandan militon, pri kiu la Historio memoras, por defendi la plej antikvajn kaj la plej altajn sopirojn kaj la plej necesegajn interesojn de nia Patrujo. Granda nuntempa milito ne entenas kaj forportas en sia ciklono nur la militantojn, sed ankaŭ ĉiujn, kiuj restas dome; neniuj povas el ĝi liberiĝi: kiu al Patrujo ne donas sian brakon, tiu devas doni la intelekton, la havaĵojn, la koron, la rezignojn kaj la oferojn. (*Aplaŭdojn*).

### **NIA MILITO ESTAS SANKTA.**

Tutan suprenlevigon kaj altegigon de Popolo oni devas voli kaj plenumigi. Tiuj, kiuj restas hejme, devas agi tiel, ke la nacia vivo disvolviĝu seninterrompe, tiel ke tiuj familioj, kiuj perdas siajn subtenantojn, estu ĉiuforme subtenataj, tiel ke la koroj konserviĝu altaj kaj fortaj, pretaj al ĝojoj plej intensaj kaj al doloroj plej kruelegaj, pretaj por ĉio, sed havantaj konfidon en la venko fina; ĉar justa estas la kaŭzo, kiu nin movis, kaj nia milito estas sankta milito. (*Brave! Aplauĉojn vivegajn*).

Estas necese, ke pri la justeco de nia afero, pri la sankteco de nia milito, la Italoj de ĉiu rango havu ne nur kiel mirinde ili montras havi, la senton propramovan, instinktan, profundan, sed ankaŭ rezonitan konvinkon. Estas necese, ke pri tio estu konvinkata la civilizita mondo. (*Bonege*).

### **LA MALAMIKA KOLERO.**

Mi turniĝas al Italujo kaj al la civilizita mondo por montri, ne per atakaj vortoj (*brave! aplauĉojn*), sed per faktoj precizaj kaj dokumentitaj, kiamaniere la malamika kolero vane provis malnobligi la altan indecon moralan kaj politikan de l'afero, kiun niaj armiloj venkigos (*brave! aplauĉojn*). Mi parolos kun la serena trankvileco, pri kiu donis noblegan ekzemplon la Reĝo de Italujo (*aplaŭdojn vivegajn; Vivu la Reĝo!*) vokante al la armiloj la te-

rajn kaj marajn soldatojn. Mi parolos kiel mi devas, konservante la respekton ŝuldatan al mia grado kaj al la loko el kiu mi parolas (*brave! aplaŭdojn*). Mi povos ne atenti pri la insultoj skribitaj en la imperiestraj, reĝaj kaj ĉefdukaj proklamoj. Ĉar mi parolas el la Campidoglio (Kapitolo) kaj mi riprezentas, en tiu ĉi solena horo, la Popolon kaj la Registaron de Italujo, mi, modesta burĝo, min taksas treege pli nobla ol la ĉefo de la Habsburg-Lorenanoj. (*Brave! aplaŭdojn vivegajn*).

La mezvaloraj Ŝtathomoj, kiuj kun trosenkonsidera malseriozeco, erarante en ĉiuj iliaj antaŭvidoj, ekfajrigis, en la pasinta julio, tutan Eŭropon kaj eĉ siajn domojn, ekvidante nun la novan kolosan eraron, en la Parlamentoj de Budapeŝto kaj de Berlino elverŝis sian koleron per brutaj vortoj kontraŭ Italujo kaj ĝia Registaro, kun la celo evidenta sin pardonigi de siaj regatoj ilin ebriigante per kruelaj vidaĵoj de malamo kaj de sango. (*Brave!*).

La Kanceliero de la germana Imperio diris, ke li enfermas en sia animo, se ne malamon, tamen koleron. Kaj certe li diris la veron: ĉar li rezonis malbone, same kiel oni rezonas dum la atakoj de furiozeco (*bonege! oni ridas*). Mi ne povus, ankaŭ se mi volus, imiti ilian lingvaĵon. La atavisma reveno al la prabarbareco estas pli malfacila por ni, kiuj de ĝi estas dudek jarcentojn pli malproksimaj. (*Bravega!*).

#### LA AGO DE KRIMINALA FRENEZECO.

Ni ne atentu la vortojn; ni sekvu la kaŭzojn kaj la faktojn. La fundamenta tezo de la Ŝtathomoj de la Centra Eŭropo konsistas el tiuj du vortoj: perfido kaj surprizo, turnitaj al Italujo, perfido kaj surprizo kontraŭ ĝiaj fidelaj kunliganoj.

Estus facile demandi ĉu rajtas paroli pri kunligo kaj pri respekto al la traktatoj tiu, kiu riprezentante, kun tiom pli malgranda genieco sed kun sama morala indiferenteco, la tradicion de Federiko la Granda kaj de Otono von Bismarck, proklamis, ke neceso ne havas leĝon kaj konsentis, ke lia Lando piedpremu, bruligu, dronigu en fundon de Oceano ĉiujn dokumentojn kaj ĉiujn civilajn kutimojn de la publika internacia juro (*aplaŭdojn*). Sed tiu ĉi estus tro facila kaj nur antaŭjuĝa argumento. Anstataŭe ni ekzamenu pozitive kaj trankvile ĉu la kunliganoj rajtas sin voki perfiditaj kaj surprizitaj de ni.

Jam de longe estis konataj niaj deziroj, kaj konata ankaŭ estis nia juĝo pri la ago de kriminala frenezeco, per kiu ili malordigis la Mondon kaj senigis la Interligon je la motivo daŭri. La *Verda Libro* aranĝita de Sidney Sonnino, al kiu estas gloro de mia vivo esti ligata per plena solidareco post tridek jaroj de amikeco, en tiu ĉi grava horo.... (*tre vivajn aplaŭdojn: kriojn de: Vivu Sonnino!*) ....la *Verda Libro*, kiu pli ol kiu ajn alia kajero de diplomaciaj dokumentoj penetris en la vivon, en la konsciencon de l' Popolo, de decembro ĝis majo, montras la tre longedaŭrajn, penigajn, senutilajn traktadojn. Sed ne estas vere, kiel artifice oni provas kredigi, ke la Ministraro, restariĝinta en novembro, ŝanĝis la direkton de nia internacia politiko. La

Itala Registaro, kies linio de konduto neniam ŝanĝiĝis (kaj tion mi ĝojas diri por honori la memoron de la glora amiko kaj kolego, kies sola plendo, antaŭ lia morto, estis ke li ne vidis la tagon de la naciaj depostuloj de li fervore deziritan), la Itala Registaro severe juĝis, tuj kiam ĝi ĝin konis, la atakon de Aŭstrio kontraŭ Serbujo kaj antaŭvidis la konsekvencojn ne antaŭviditajn de tiuj, kiuj tiel senkonsciencie antaŭpensis la agon. Jen estas la pruvo. Mi legos, ĉar estas dokumentoj.

### NOVAJ DOKUMENTOJ.

La 25<sup>an</sup> de julio markizo De San Giuliano (tiam Itala Ministro de la Ekst. Aferoj) telegrafis al Duko D'Avarna, kiel sekvas: « *Hodiaŭ ni havis longan triopan interparoladon, la Prezidanto de la Ministraro, Sinjoro Flotow (tiam ambasadoro de Germanujo) kaj mi: tiun interparoladon mi resumas por informo de Via Moŝto kaj por eventuala gvido en Via sintenado.* (Egala depeŝo estis sendita al Berlino).

*Salandra (prezidanto de l' Ministraro) kaj mi (Markizo De S. Giuliano), rimarkigis antaŭ ĉio al Ambasadoro, ke Aŭstrio ne rajtis, laŭ la spirito mem de Triopa Interligo, fari diplomatian agon kiel tiu farita ĉe Belgrado, sen antaŭa konsento kun siaj kunliganoj. Efektive, Aŭstrio (daŭrigas ĉiam la telegramo de 25<sup>a</sup> de julio) pro la formo de la noto kaj pro la postulaĵoj, kiuj, kvankam malmulte efikaj kontraŭ la danĝero serba, estas profunde ofendaj por Serbujo kaj nerekte por Rusujo, klare pruvis, ke ĝi volas naski militon. Tial ni diris al Sinjoro Flotow, ke pro tia agmaniero de Aŭstrio kaj pro la defenda kaj konservuma karaktero de la Triopa Interlingo, Italujo ne estas devigata helpi Aŭstrion en la okazo ke, pro tiu ago, ĝi troviĝu poste en milito kontraŭ Rusujo, ĉar kiu ajn eŭropa milito estas en tiu ĉi okazo konsekvenco de ago de ekscito kaj de atako de Aŭstrio. »*

Post malmulte, la 27<sup>an</sup> kaj la 28<sup>an</sup> de Julio ni per klaraj vortoj prezentis la demandon pri la translaso de la italaj provincoj de Aŭstrio: kaj ni anoncis, ke se oni ne atingus adekvatajn kompensojn (mi legas laŭtekstajn vortojn) « *La Triopa estus neripareble rompita* „ (tre vivajn aplaŭdojn).

La senpartia historio diros, ke, ĉar Aŭstrio trovis en julio 1913<sup>a</sup> kaj en oktobro de sama jaro Italujon kontraŭa al siaj intencoj de atako al Serbujo, ĝi provis je la pasinta somero, konsente kun Germanujo, la vojon de la surprizo kaj de la fakto plenumita. La abomena krimo de Serajevo estis ekspluatata kiel preteksto, unu monaton post ĝia okazigo. Tion pruvas la aŭstria rifuzo akcepti la cedemajn proponojn de Serbujo.

### NENIU PROMESO DE AŬSTRIO.

Kaj ne eĉ en la momento de la ĝenerala militeksplodo Aŭstrio estus kontentiĝinta de plena akcepto de la ultimato. La 31<sup>an</sup> de julio 1914<sup>a</sup>, grafo Berchtold anoncis al nia ambasadoro ke, « *se la pacperado povos*

*esti ekzercita, tamen ĝi ne devos interrompigi la militagadon jam komencitan kontraŭ Serbujo* ». (Tio estis la pacperado, pri kiu klopodadis Anglujo kaj Italujo). Ĉiuokaze grafo Berchtold ne estis preta akcepti peradon celanta mildigi la kondiĉojn montritajn en la noto aŭstri-hungara, kiuj estus povintaj logike nur esti pligrandigataj je la fino de la milito. Cetere, se Serbujo estus decidinta intertempe, konsenti, senalie, kun la supredirita noto, sin deklarante preta plenumi la kondiĉojn, kiuj estis al ĝi trudataj, « *tio ne estus povinta decidigi la Imperiestran kaj Reĝan Registaron ĉesigi la militagadon* ».

Kaj ne estas vere, ke Aŭstrio sin devigis, kiel diris la Prezidanto de la Konsilantaro Hungara, ne fari teritoriajn akirojn malprofite de Serbujo, kiu, cetere, akceptante ĉiujn altruditajn kondiĉojn, estus iĝinta vasala Stato. La 30<sup>an</sup> de julio, ambasadoro el Merey diris al markizo Di San Giuliano la sekvantajn vortojn: « *Aŭstrio ne povas fari devigan promeson pri tio, ĉar ĝi ne povas antaŭvidi ĉu dum la daŭro de la milito ĝi ne estos devigata, malgraŭ sia volo, tenadi serbajn teritoriojn* ». (*Vivajn komentariojn*). Kaj la 29<sup>an</sup> de julio grafo Berchtold komprenigis al markizo D'Avarna, ke « *li estus estonta preta preni nenian ŝuldon pri tio, kion li diris al li koncerne la eventualan agadon de Aŭstrio en la okazo de konflikto kun Serbujo* ».

#### KIE ESTAS LA PERFIDO?

Kie estas do la perfido, kie la malboneco, kie la surprizo, se, post naŭ monatoj da vanaj klopodoj por atingi honorindan interkonsenton, kiu rekonos justmezure niajn rajtojn kaj protektos niajn interesojn, ni reprenis nian agadliberecon kaj agis kiel la patruja utilo nin konsilis? Kontraŭe, estas fakto, ke Aŭstrio kaj Germanujo kredis ĝis la lastaj tagoj, ke ili traktas kun ia Italujo malkuraĝa, bruema, sed ne agema, kapabla provi per minacoj ricevi profiton sed ne jam valorigi per armiloj sian bonan rajton: kun ia Italujo, kiun oni povos paralizi elspezante kelkajn milionojn kaj intermetiĝante per nekonfeseblaj artifikoj inter Landanaro kaj Registaro. (*Vivegajn aplaŭdojn*).

Statestroj kaj fremdaj ministroj parolis pri Interligo, kies ni oficiale proklamis la rompon post kiam ili efektive estis ĝin rompintaj, parolis kiel pri ia providenco sub kies grandaj flugiloj Italujo vivis tiom da jaroj, disvolviĝis ekonomie kaj teritorie pligrandiĝis. Mi ne neos, estus malsaĝaĵo, la profitojn de la Interligo; profitoj tamen ne nur por unu sed por ĉiuj interligitoj, kaj eble ne pli multaj por ni ol por aliaj. Kial, alimaniere, la Centraj Imperioj ĝin estus volontaj kaj renovigintaj? Ĉu estis ia sentimentalulo, ia amatoro de la Bela Lando kie floras la orangarbo, Princo Otono von Bismarck? Kaj ĉu estis eble ĉiutempe karesemaj por ni la Princoj kaj la Registoj de Monarĥio aŭstri-hungara?

Sed helpas koni efektive kaj kun precizeco je datoj kaj faktoj kiel funkciadis la Interligo dum tiuj ĉi lastaj jaroj en sia spirito vera, kaj kiel ĝi



favoris nian unikan teritorian pligrandiĝon, nome la entreprenon de Libio. (Komentariojn).

### AŬSTRIO KONTRAŬ LA KONKIRO DE LIBIO.

La daŭra suspektemo, la atakemaj intencoj de la Monarĥio Aŭstri-Hungara kontraŭ la suda kunligano estas rekonataj kaj rezultas el aŭtentikaj pruvoj. La stabestro Generalo Conrad ĉiam apogis la ideon - estas iliaj vortoj - « ke la milito kontraŭ Italujo estas neevitebla, ĉu pro la problemo pri irendentaj provincoj, ĉu pro la ĵaluzo de la Reĝlando koncerne ĉion entreprenatan de la Monarĥio en Balkanlandoj kaj en orienta Mediteraneo ». Kaj aliloke « Italujo volas plivastigi sian teritorion tuj kiam ĝi estos preta; kaj dume ĝi kontraŭstaras ĉion, kion ni volas entrepreni en Balkanlandoj. El tio sekvas, ke oni devas ĝin malaltigi por havi la manojn liberaj ». Kaj li bedaŭris, ke jam de 1907<sup>a</sup> oni ne estis atakintaj Italujon (oni komentarias). La aŭstria Ministro pri fremdaj aferoj mem rekonis, ke en la militista partio estas « disvastigita la opinio, ke oni devas militsubpremi la italan Reĝlandon, ĉar de tiu ĉi elvenas la forto de altirado por la italaj provincoj de la Imperio; kaj do kun la venko sur la Reĝlando kaj ĝia politika neniigo ĉesus ĉiu espero por la nekunigitaj samnacionoj. Dume ĝis la momento de la milito (kiun oni devus - pro la reciproka kresko de la du Ŝtatoj - ĉiel akceli) oni devus subpremi la italajn provincojn kun punsevereco kaj kun kontraŭstaro al ĉiu deziro pri kulturdemandoj. »

De tiu pensmaniero rezultas evidentaj la sincereco kaj la lojaleco, per kiuj oni prokrastis dum tiom da jaroj la solvon de la demando pri la Itala Universitato en Triesto! (Aprobojn).

Kaj nun ni vidu kiel la kunliganoj nin helpis por la akiro de Libio. Mi diris nur tion, kio rezultas el dokumentoj.

### LA MINACIOJ EN 1911.<sup>a</sup>

La militagoj brile komencitaj de Duko de Abrucioj kontraŭ turkaj torped-boatoj kunigataj en Prevesa (Prèveza) estas ĉesigitaj de Aŭstrio malafable kaj absolute. Grafo Aehrenthal sciigis la unuan de oktobro 1911<sup>a</sup> al nia ambasadoro en Vieno, ke niaj militmovoj lin penige impresis, kaj ke oni ne povis permesi ilian daŭradon; estis urĝe fini ilin, kaj doni ordonojn por ke ili plu ne okazu en la akvoj ĉu de Adriatiko, ĉu de Jonio. Eĉ pli minace la sekvantan tagon la ambasadoro de Germanujo en Vieno konfidencie informis nian ambasadoron, ke Aehrenthal lin estis petinta telegrafi al sia Registaro, ke ĝi komprenigu al la Itala Registaro, ke, se ĝi daŭros sian ŝipoperaciojn en Adriatiko kaj Jonio, ĝi direkte haviĝos kontraŭ Aŭstri-Hungarujo. (Kom.)

Kaj ne nur en Adriatiko kaj Jonio Aŭstrio paralizis nian agadon. La 5<sup>an</sup> de Novembro Grafo Aehrenthal informis Dukon D'Avarna, ke li estis sciiginta pri kelkaj italaj sipoj anoncintaj apud Saloniko, kie ili estis farin-

taj elektrajn lumjetojn. (*Mallongajn ridojn*). Li deklaris, ke iu nia ago sur la Otomanaj bordoj en Eŭropa Turkujo kaj sur la insuloj de Egeo, povus esti tolerata nek de Aŭstri-Hungarujo nek de Germanujo, ĉar ĝi estus kontraŭa al la traktato de la Triopa Ligo.

Dum marto 1912<sup>a</sup> Berchtold, intertempe sekvinta Aehrenthal'on en la ministrofico, deklaris al la Germana ambasadoro en Vieno ke « koncerne iun nian militagadon kontraŭ la Otomanaj marbordoj en Eŭropo kaj kontraŭ la insuloj de Egeo, li konservis la vidpunkton de Aehrenthal, laŭ kiu tiuj agoj estis kontraŭaj al la devoj sur nin prenitaĵoj kun la sepa artikolo de la traktato de la Triopa Ligo ». Pri nia movo kontraŭ la Dardaneloj, li ĝin konsideris kontraŭa: 1.<sup>e</sup> al la promeso de ni farita ne veni al ia ago, kiu povos meti en danĝeron la *statu quo* de Balkanlandoj - 2.<sup>e</sup> al la spirito mem de la Traktato, kies bazo estis la konservado de « tiu *statu quo* ».

Poste, kiam nia eskadro, troviĝante ĉe la enirejo de Dardaneloj, estis bombardata de la fortikaĵoj de Kum Kaleh kaj kontraŭagis difektante la fortifikaĵojn, Berchtold plendis pro la okazintaĵo, ĝin konsiderante kontraŭa al la faritaj promesoj; kaj deklaris, ke « se la Reĝa Registaro dezirus repreni sian liberecon, la Imperia kaj Reĝa Registaro estus povanta fari samon. » (*Komentariojn*).

Li aldonis, ke li ne povos akcepti, ke ni estontece faros militagojn similajn je tiu farita, aŭ iel kontraŭajn al lia vidpunkto. Tiel al ni estis malpermesata la projektita okupo de Kio.

### LA MALFRUAJ CEDAĴOJ.

Ne estas necese rimarki kiom da vivoj de soldatoj kaj kiom da milionoj al ni kostis la daŭra malhelpado al ĉiu nia solva ago kontraŭ Turkujo (*aprobojn*). Ĝi sciis sin protektata de nia kunliganoj kontraŭ ĉiu atako al sia esenca parto (*aprobojn kaj aplaŭdojn*).

Alian riproĉon al ni maldolĉe oni faris: ke ni ne restis kontentaj je la mirindaj cedaĵoj, kiujn oni proponis al ni dum tiuj ĉi lastaj tempoj! Antaŭ ĉio oni povus fidi: « ĉu tiuj ĉi cedaĵoj estis proponataj lojale! » (*Mallongan ridadon, aprobojn*). La suspekto naskiĝas legante la lastajn dokumentojn. La Imperiestro Francisko Jozefo diris, ke Italujo rigardis avidokule la apartenaĵon de lia Dinastio. La kanceliero Bethmann-Hollweg diris, ke kun tiuj ĉi cedaĵoj oni intencis « *aĉeti nian neŭtralecon* ». Aplaudu nin do, sinjoroj, ke ni ilin ne akceptis. (*Aprobojn, longegajn aplaŭdojn*).

Ni tamen rigardu la esencon de la aferoj. Tiuj ĉi cedaĵoj, eĉ akceptante la lastan malfruan eldonon, kiu venis en la manojn de la ministro de la eksterlandaj aferoj kaj miajn, jam estinte en la manoj de politikistoj kaj ĵurnalistoj trans kaj maltrans la landlimo.... (*viglegajn aplaŭdojn; kriojn de « Vivu Salandra! »*) .... tiuj ĉi malfruaj cedaĵoj, kiujn ni tamen volas kredi sinceraj, neniel respondis al la celoj, kiujn la itala politiko devis proponi al si.

Tiujn ĉi celojn oni povas resumi en tri punktoj: 1) la defendon de la italeco, nia unua plej granda devo; 2) sendanĝeran, militistan landlimon, anstataŭantan tiun al ni altrudatan en 1866<sup>a</sup>, pro kiu ĉiuj pordoj de Italujo estas malfermitaj al niaj malamikoj; 3) strategian situacion en Adriatiko malpli danĝeran, malpli malsukcesan ol tiu, kiun ni havas kaj kies rezultatojn vi vidas en tiuj ĉi tagoj.

### KAJ LA RIFUZOJ.

Ĉiuj ĉi utiloj, esencaj por ni, estis al ni fakte rifuzataj. La oferpropono, iom post iom pligrandigata de Trentlando, ne atingis, neniam atingis la mallarĝejoj de Adige (Adiĝe); kaj forlasis Ampezzolandon (Ampecco), tiun Cortina'n (Kortina), en kiun nune niaj soldatoj estas alvenintaj (*viglegajn aplaudojn*), kun la preteksto, ke tie ne estas italaj nacioj, sed ladinaj popoloj (*mallongan ridadon*), kiel se la diferenco inter ladinoj kaj italoj ne estus senfine pli malgranda ol inter ladinoj kaj germanoj!

Kaj ni ne deziregis tion pro la graveco de la lando: sed ĉar, estante la Ampezzolando maltrans la Alpoj, kaj ne alvenante nia nova limo al la mallarĝejoj de Adige, restis malfermitaj, kiel antaŭe, la pordoj de nia domo. En la *Verda Libro* oni povas legi naivan aŭstrian dokumenton en kiu proksimume estas tiel dirate: « Ne, tion ĉi ni ne povas al vi doni, tio difektus nian militan landlimon ». Sed la afero ne estis pri defenda milita landlimo por Aŭstrio, ĉar prava estus estinta ĝia pretendo ne lasi malfermitaj la pordojn de sia domo; sed pri atakema milita landlimo kontraŭ Italujo, ĉar oni volis lasi malfermitaj la pordojn de nia domo.

Inda loko en Adriatiko estis al ni tute rifuzata. Sur Adriatiko nenian cedaĵon oni al ni iam proponis, ne eĉ lastmomente; kaj kiam ni, kun ploro en l' animo, sed pensante, ke ĉiun plej grandan oferon oni devis fari por eviti militon, nin submetiĝis peti kiel minimumon, ke Triesto, kaj ĉirkaŭa regiono estu konsiderataj ne parto de la Itala Reĝlando, sed ne plu parto de l'Austria Imperio, kaj ricevu konstitucion de libera Ŝtato, tion ĉi oni al ni rifuzis; kaj al Triesto oni promesis kion? la administran aŭtonomion (*koment.*).

Kaj alia gravega parto de la problemo pridiskutita estis tiu de la promesoj. Mi pensas kion estus dirinta nia Parlamento se ni, Registoj, estus nin prezentitaj anoncante, ke ni tute interkonsentis kun Aŭstri-Hungarujo, estus ricevontaj parton de Trentlando kaj kelkajn aliajn terpecetojn ne trans Isonzo (Izonco), sed post repaciĝo. (*Komentariojn*). Tiu « post repaciĝo », pli malfrue mildiĝis kun la propono, en lastega tago, de la elekto de komisionoj, kiuj estus studentaj la limon, post kio estus venontaj la aproboj; post tiuj aproboj, en la templimo de unu monato, oni estus okupontaj la landon.

### VASALECO, NE.

Sed oni kontraŭdiras al ni, ke pri plenumo ni ne estus devontaj dubi, ĉar Germanujo estus garantiinta. (*Komentariojn*). Ne decas troigi per malnoblaj

suspektoj. Ni supozu tiun ĉi garantiaĵon donita kun perfekta intenco ĝin efektiviĝi. Ni supozu, ke Germanujo, ĉe l' fino de la milito, estus estonta en kondiĉo plenumi la donitan promeson, kio ne estas certe. (*Komentariojn*). Kia estus estonta nia kondiĉo post tiu ĉi akordiĝo? Estus estonta nova Triopaligo, renovigata Triopaligo, sed en aliaj kaj malsuperaj kondiĉoj ol antaŭe, ĉar ni estus havontaj unu ŝtaton estregan kaj du ŝtatoj vasalajn. (*Komentariojn*). La tagon, en kiu unu el la kondiĉoj de la traktato ne estus plenumata, la tagon, en kiu, post mallonga tempo, post jaroj, la urba aŭtonomio de Triesto estus rompata de iu ajn imperia dekreto aŭ de iu ajn leŭtenanto, al kiu ni estus povontaj nin turni? ĉu al la komuna ĉefo, Germanujo? (*Mallonga ridado, aplaŭdojn*).

Nun, sinjoroj, mi volas diri al vi, ke pri Germanujo mi ne intencas paroli sen admiro kaj sen respekto. Mi estas unua ministro de Italujo, ne Germana Kanceliero; kaj mi ne perdas la lumon de la saĝeco. (*Viglegajn aplaŭdojn*).

*heg-*  
Sed kun la tuta respekto ŝuldata al la klera, al la potenco, al la granda Germanujo, mirinda ekzemplo de organizado kaj rezistado, mi devas diri, en nomo de mia Lando: vasaleco, ne; flanke de neniu. (*Aplaŭdojn*). La revo pri universala egemonio estas rompita. La mondo ribelis, la paco kaj civilizacio de la estonta homaro devas fondiĝi sur la respekto de la plenumiĝintaj naciaj aŭtonomioj (*viglegajn aplaŭdojn*), inter kiuj la granda Germanujo devos sidiĝi egala kun la aliaj, sed ne kiel mastro. (*Viglegajn aplaŭdojn*).

### LA INSULTOJ DE LA KANCELIERO.

Sed la plej rimarkindan ekzemplon de la senmezura fieregeco, kun kiu la homoj, kiuj direktas la politikon de la Germana Imperio konsideras la aliajn naciojn oni eltiras de la reprezentado, kiun la Kanceliero Bethmann-Hollweg faris de la itala politika mondo. Mi volas ĝin legi en pli kompleta resumo ol tiu, kiun donis la gazetoj: laŭ resumo alveninta la sekvantan tagon. Jen tio, kion pri ni diris la Germana Kanceliero:

*La Italaj Ŝtatestroj faris kontraŭ sia popolo la saman trompludon ol kontraŭ ni.*

*Sendube la posedo de landoj de itala lingvo norde de la landlimoj estis objekto de la revoj kaj de la deziroj de ĉiu Italo. Sed la fakto estas, ke granda parto de la itala Popolo, ke la plejmulto de la Parlamento ne volis militon. Dum la unuaj tagoj de Majo, laŭ la observoj de la plej bona konanto de la italaj aferoj (ridoj), kvar vinonoj de la Senato, du trionoj de la Ĉambro estis ankoraŭ kontraŭ la milito. Inter ili - daŭrigas la Kanceliero Bethmann-Hollweg - sin trovis la ŝtatestroj plej seriozaj kaj plej aŭtoritataj. Sed la voĉo de la saĝo jam ne estis aŭskultata; nur la ŝipopolo regis. Kun la kuraĝiga toleremo kaj la apogo de la ĉefaj membroj de la Ministraro, superplenigitaj je oro de la Triopa Interkonsento (viglegla ridado, Hon. Salandra klarigas, ke la franca teksto diras: "gorgées d'or,") la popolaĉo,*

gvidita de senskrupulaj incitagentoj, estas puŝita al sanga frenezo, minacante al la Reĝo la revolucion kaj al ĉiuj konservativuloj la mortigon, se ili ne estus sin allasantaj al la deliro de la milito. (Kom.). Oni lasis pro pripensita decido, nekonata al la itala Popolo, la iradon de la interkonsentoj kun Aŭstrio kaj la gravecon de la aŭstriaĵ koncesioj, tial ke, post la ekŝigo de la Ministraro Salandra, oni trovis neniun, kiu kuraĝus akcepti la komision formi novan Ministraron. (Kom.). Kaj dum la decidaj diskutoj, neniun membro de la konstituciaj partioj de la Senato kaj de la Ĉambro eĉ provis taksu la valoron de la cedaĵoj tiel larĝaj de Aŭstrio. (Kom.). Kaj en tiu militfrenezo, honestaj politikistoj mutiĝis. Sed kiam, en la sekvo de la militoperacioj, kial ni esperas kaj deziras, la itala popolo resaĝiĝos, ĝi rekonos kiel malsingardeme ĝi estis puŝita partopreni en tiun ĉi mondmiliton. » (Viglegajn komentariojn).

### ERAROJ DE BÜLOW

Mi ne scias, sinjoroj, ĉu en tiu ĉi homo, blindigita de la kolero, estis la intenco ofendi persone niajn kolegojn kaj min, (se tiel estus, mi ne rimarkus tion), homojn, kies vivon vi konas, homojn, kiuj estas servintaj la ŝtaton ĝis tiu ĉi maljuna aĝo, de famo senmakula (*grandajn aprobojn*), homojn, kiuj donas al la Nacio la vivon de siaj filoj (*grandegajn aplaŭdojn*). Sed ne pensu al ni; prefere atentu la kruelecan insulton, kiun tiu vandala prozaĵo ĵetas kontraŭ la reĝo, kontraŭ la politikuloj mem, kiuj havis opinion diversan ol la nia. Ĉiuj mutaj, oni diras; do ĉiuj malkuraĝaj. La informoj, sur kiuj tiu ĉi juĝo estas fondita, estas alskribitaj, de la Kanceliero de la Imperio, al tiu, kiun li alnomas « la plej bona konanto de la italaj aferoj ». (Kom.).

Eble li aludas, kun frata deziro, ĵeti sur lin la respondecon, al la princo von Bülow.

Nun, sinjoroj, mi volas, ke pri la intencoj de la Princo von Bülow vi ne havu eraran opinion. Mi kredas, ke li havis veran simpatian por nia lando, kaj ke li faris ĉion, kion li povis por alveni al ia interkonsento. (Kom.).

Sed kiajn kaj kiomajn erarojn, por efektiviĝi siajn bonajn intencojn! Li supozis, ke Italujo povis sin deturni de sia direkto dank' al iu malbone elspezita miliono, dank' al la influo de malmultaj personoj, kiuj perdis la interrilatojn kun la nacia animo (*grandajn aprobojn*) per malrektaj interrilatoj provitaj, sed mi esperas kaj kredas nesukcesintaj, kun italaj politikuloj (*grandajn aprobojn*). De tio devenis kontraŭa rezultato. Grandega eksplodo de indigno ekflamis en la tuta Italujo, kaj ne en la popolaĉo, sed en la rangoj vere superegaj, en la plej noblaj koroj, en ĉiuj, kiuj sentas la indecon de la Nacio, en la tuta junularo, kiu estas preta doni al la idealeco de la patrujo sian tre puran sangon. (*Aplaŭdojn*).

Eksplodo de indigno flamis ĉe la suspekto, ke fremda ambasadoro intermetiĝus inter Registaro, Parlamento kaj Civitanoj. (*Grandajn aprobojn*).

### LA SANKTA FAJRO.

En tiu ĉi fajro la internaj malkonsentoj malaperis, kaj la tuta Nacio fandiĝis en mirindan moralkonsenton, kiu estos nia plej granda forteco en la malfacila provo, kaj kiu devos nin konduki, dank' al nia virto, ne dank' al bonvola cedo de aliaj, al la efektivigo de la plej grandaj Patrujaj sortoj. (*Grandajn aplaŭdojn*).

Antaŭhieraŭ Eklezia princo ordonis al la pastraro de sia ĉefepiskoplando: « Enspiru la firman decidon de la disciplino plej neŝancebla kaj de la sincera amo al nia lando, kiu igu al kiu ajn neeble inciti malkonsentojn, en momento en kiu la konsento estas superega devo. Hieraŭ vi povis diskuti, morgaŭ vi ĝin povos ankoraŭ; hodiaŭ ne ». (*Grandajn aprobojn*). Kaj la saman tagon la Prefekto de nobla Emilia urbo, en kiu jam de longe la plejmulto apartenas al la socialista partio, telegrafis al mi, kortuŝita de patruja amo, ke la memvoluloj ciklistoj forpedalis inter la entuziasmo de la popolo, kaj ke fine, post naŭ jaroj, la trikoloro svingas el la urbdomo. (*Grandajn aplaŭdojn*).

Tiu ĉi morala unueco, sinjorinoj kaj sinjoroj, elmontriĝas neŝanceble en la militfaraĵoj, en tiuj, kiuj batalas kaj en tiuj, kiuj restas hejme, en la mortantoj kaj en la postvivantoj. Enirintaj en la grandan krizon, ni ne devas esti malpli fortaj kaj indaj ol aliaj popoloj interligitaj aŭ malamikaj; de la reĝo, kiu interpretante - kiel ĉiam la Sovojanoj - la popolan senton kaj la naciajn dezirojn, estas ĉe la bataalkampo, konfidante ŝian reĝinan Moŝton kaj la junajn filojn al la gardo de la Roma Popolo (*grandegajn aplaŭdojn, kriojn de « Vivu la Reĝo! »*), ĝis la plej humilaj laboristoj de la urbo kaj de la kamparo, ĝis la virinoj, ĝis la junuletoj, unu por ĉiuj kaj ĉiuj por unu, ĉiuj havantaj fidon, ke per nia superegada penado, ni liveros al la estonta generacio Italujon pli kompletan, pli fortan, pli honoritan, Italujon, kiu sidiĝos inter la kunsido de la nacioj, nek vasala, nek protektata, sed neatakebla en siaj naturaj landlimoj; Italujon, kiu revenos al la fruktigaj konkuroj de la paco, defendantan, kiel ĝi estis ĉiam, de libereco kaj de justeco en la Mondo. (*Grandegajn aplaŭdojn*).

Kaj ĉar al nia generacio, la sortoj difinis la taskon teruran kaj belegan konduki al plenumo la idealon de granda Italujo, kiun la herooj de la Liberrigo ne povis vidi efektivigita, ni akceptu tiun ĉi taskon kun nevenkebla animo, pretaj doni al la Patrujo ĉiujn nin mem, tion, kio ni estas, tion, kion ni posedas. Antaŭ la Trikolora flago, kiu flirtas ĉe la bataalkampo apud la sankta persono de la Reĝo, kliniĝu ĉiuj standardoj, kuniĝu ĉiuj animoj en la unuaniman fidon, ke en tiu signo ni venkos. Vivu Italujo, Vivu la Reĝo! (*Aplaŭdojn grandegajn, kriadojn de « Vivu la Reĝo! Vivu Italujo! »*).